

# REVENO AL EDINBURGO EN MAJO 2017

Celante ripeti la sukcesan formulon uzitan en 2012, la Esperanto-Asocioj de Britio kaj Skotlando kunigos siajn naciajn kongresojn en unusolan okazonton en Edinburgo en 2017.

La "kunkongreso" okazos de vendredo la 19a de majo ĝis dimanĉo la 21a. Ĉi-foje ni kunvenos ne en la sama loko kiel en 2012, sed en **The Melting Pot** (5 Rose Street, Edinburgh, EH2 2PR—[themeltingpotedinburgh.org.uk](http://themeltingpotedinburgh.org.uk)), troviĝanta nur 2-minutojn piede for de Princes Street kaj 5-minutojn for de stacidomo

Waverley, en la koro de Edinburgo.

Kiel en 2012 la organizantoj estas Clare Hunter, Hju Rid, Ed Robertson kaj Tim Owen, kaj ili starigos **aldonajn aranĝojn post la finiĝo de la kongreso**.

## POSTKONGRESO

Vespere post la fermiĝo oni kunvenos por **grupa manĝo** en loka restoracio. Kaj la lundon oni faros **ekskursion** per la nove refarita fervojo Borders al **Tweedbank, kaj poste vizitos la apudan Abbotsford**, hejmon de Sir

Walter Scott.

La organizantoj jam ricevis provizoran jes-respondon de proponita internacia gastpreleganto, sed ne anoncos la nomon ĝis la celata gasto estos ricevinta forpermeson de la laborejo. Kiel en la lastaj jaroj, la kunkongreso estos senkotiza por homoj kiuj vizitas de siaj transmaraj loĝlokoj.

Pliaj detaloj aperos baldaŭ ĉe [britakongreso.org](http://britakongreso.org) kaj ĉe niaj sociaj komunikiloj ... kaj kompreneble en la venonta Update, kiu eldoniĝos en oktobro.



## ESPERANTO-TAGO 2016

La 26-an de julio Esperanto festas sian 129-an datrevenon, ĉar tiun daton en 1887 aperis Международный языкъ, la ruslingva unua libro publikigita pri la nova "internacia lingvo" de iu mistera Doktoro Esperanto.

Okaze de la venonta "Esperanto-Tago" la Universala Esperanto-Asocio pretigis afiŝojn kun la trafesprimoj "Justa Komunikado" en pluraj lingvoj, inkluzive de la angla. Tiuj afiŝoj disponeblas en pluraj formatoj, ĉu por presi sur paperon, ĉu por plusendi per virtualaj rimedoj.

Vi povas elŝuti la afiŝojn de [espinfo.org/eo-tago-afishoj](http://espinfo.org/eo-tago-afishoj) kaj uzi mem laŭplaĉe okaze de la nova vivjaro de Esperanto.



ESPERANTO

## ESPERANTO DAY

26.07.2016



Fair communication



Learn Esperanto: [www.learnu.net](http://www.learnu.net)

About languages: [www.lingvo.info](http://www.lingvo.info)  
About interethnic communication: [www.esperanto.net](http://www.esperanto.net) | [www.uea.org](http://www.uea.org)

THE INTERNATIONAL LANGUAGE

The official newsletter of the **Esperanto Association of Britain**

[esperanto.org.uk](http://esperanto.org.uk) • [eab@esperanto.org.uk](mailto:eab@esperanto.org.uk) • ISSN: 1741-4679 • Charity Number: 272676

ISSUE 74  
JULY 2016  
UPDATE





**Long time, no see! Well, at least as far as Update goes, the "April" issue having had to come out in January because of the very early AGM. There's been a fair bit happening since then.**

I'm typing this having just come back from another exhausting but exhilarating weekend at Esperanto House with our new learners, most of whom came our way after learning Esperanto on Duolingo. Our session for beginners, Lernu, sold out within three weeks of the previous session, back in April, having finished! Esperanto House was packed to the rafters, even with a couple of last-minute cancellations. We had about a third the number of people signed up as we've managed for our conference in some recent years!



Alina Mironova & Kat Newbould, new to Esperanto and now new members of EAB

You might notice that the list of new members is lengthier this issue than usual. It also contains a lot more younger people than it normally does. These two things aren't coincidental, several sign-

**I was awarded the Diploma of the (then) British Esperanto Association in 1968, which marked a turning point in my love affair with the International Language.**

You see, I started taking it seriously. I asked myself "What can I do in Esperanto?" To my amazement, the answer wasn't just "Write to people in different countries" (although I did my share of that). I was thrilled by the idea that I could translate things or even write original material that would appeal to a general readership.

When Ian Parker resigned as Editor of *Kial Ne?* (the magazine of the youth section, JEB), I took over, drawing (and lettering) each page by hand. No computers back then! I couldn't keep it going forever, of course, and the final issue was the "festa numero" published in 1978. I recently put that issue online—all 100 pages of it—at [kialne.info](http://kialne.info), so that

ups having occurred over this weekend with our new, predominantly Duolingo contingent liking what they saw and wanting to support it.

You can read a report (in English) from one of our new members, Kat Newbould, who attended one of our Lernu sessions last October and migrated to Lernu Plu this time, at [esperanto.org.uk/events/lernu/reports](http://esperanto.org.uk/events/lernu/reports). I think it's well worth five minutes of anybody's time to read something so positive.

### LIVERPOOL WAS THE ESPERANTO CAPITAL

Many of us were present in the Beatles' home city for two Esperanto events in March. The University of Liverpool hosted a three-day seminar, the Buchanan Masterclass, which was organised by Angela Tellier (in a voluntary capacity rather than for EAB) and featured contributions from Wim Jansen, Anna Lowenstein, Paul Gubbins, Duncan Charters and Renato Corsetti. Feedback from the 52 participants was that it was excellent. The 5<sup>th</sup> annual Buchanan lecture will be given by professor Sabine Fiedler on October 20<sup>th</sup>.

It was followed by our annual conference, at the Gateway Centre. There was much to enjoy, particularly the Beatles competition in which several of our friends sang Esperanto translations of the Fab Four's songs. Thank you to those of you—the translators and the performers—who contributed. The conference's youngest attendee, eight-year-old Maggie, did sterling work as the judge and awarded two first prizes, to Peter Bolwell and Elizabeth "Cilla Black" Stanley.

### NEW PRESIDENT

Ian Carter was elected president of EAB

anyone could re-discover my somewhat irreverent cartoon strip "Superzam", laugh at some jokes, or even do a cryptic crossword!

Now I find myself, all these decades later, taking over the reins from Paul Gubbins as *provisional* editor of **La Brita Esperantisto**. It's exciting, but also a bit daunting, and I'd like to ask anyone who's interested to send me material to be considered for publication at [ian.carter@esperanto.org.uk](mailto:ian.carter@esperanto.org.uk). If you were at the conference or Buchanan Masterclass in Liverpool, I'd be delighted to receive reports and photographs.

And if you'd like to be considered

for the editorial role, please contact me or Tim Owen at [tim.owen@esperanto.org.uk](mailto:tim.owen@esperanto.org.uk).

at this year's AGM. He's been an Esperantist for nearly half a century. That doesn't mean he's old, by the way—he just started out very young! Back in his early days he even corresponded with Gaston Waringhien—I've seen "Jano Carter" mentioned in GW's *1887 kaj la sekvo*. Ian couldn't be present at the conference in Liverpool in person because he was already contracted to work elsewhere over the weekend before we set the date, but he still managed to appear virtually, sending a short video clip to the event.



Ian Carter, new president of EAB

### EXAM SUCCESS

Renato Corsetti successfully ran an exam session in Esperanto for the Common European Framework of Reference. There were, I think, nine candidates at different levels. EAB agreed to pay back the exam costs of successful candidates in order to encourage participation. The candidates will receive their diplomas from Renato at a meeting of the London Esperanto Club on September 9<sup>th</sup>.

### KOMITATANO-A

I asked at the previous two AGMs that people who would be interested in representing EAB on UEA's committee let us know. The role requires participation in a discussion list and in two or three meetings at the *Universala Kongreso*. UEA and EAB each pay half of the UK kotizo for the occupant.

The role is now vacant for the period 2016-19 because nobody has volunteered for it. If you think you might be willing to carry it out, please get in touch.

### ESPERANTO CYMRU

Hats off to Dee McCarney, who has launched a website for Esperantists from Wales at [esperantowales.wordpress.com](http://esperantowales.wordpress.com). Dee has even gone to the trouble of writing nearly all the content in Esperanto, English and Welsh too! It's also useful for people *outside* of Wales. For example, you'll find details about the *Internacia Amikeca Renkontiĝo* in Aylesford, from the 9<sup>th</sup> to the 12<sup>th</sup> of September, and the 2<sup>nd</sup> *Tutkelta Kongreso* in Brittany, from the 13<sup>th</sup> to the 20<sup>th</sup> of August.

You can find details about EAB's own events and sign up for them at [esperanto.org.uk/events](http://esperanto.org.uk/events).

Ian Carter

Tim Owen

# CALENDAR FOR THE REST OF 2016

We're pleased to say that the second half of the year features more EAB courses and events.

**Somerlernejo:** La 13an kaj 14an de aŭgusto ĉe nia sidejo, Esperanto House, okazos la ĉi-jara Somerlernejo, kiun gvidos Jack Warren (mezniveluloj) kaj Paul Gubbins (altniveluloj). Kiuj ĉeestis niajn antaŭajn Somerajn Festivalojn, tiuj scios kion atendi de tiuj du tre spertaj instruistoj. Por unuafojuloj ekzemplaj ekzercoj troviĝas en la prieveinta retpaĝo, [esperanto.org.uk/events/somerlernejo](http://esperanto.org.uk/events/somerlernejo).

Jack klarigas, ke "en la progresanta grupo studentoj plifortigos sian komprenon de Esperanto per diversaj lingvaj ekzercoj. Tiuj estos precipe parolaj kaj ankaŭ celos amuzon. Inter kromaj temoj pritraktataj estos la internacia poŝtserĉo, difinoj de vortoj el PIV (kun kvizo), aŭtoŝildoj de Eŭropo kaj la vivociklo de la papilio."

Paul sciigas, ke "en la progresinta grupo ni pritraktos diversajn tekstojn de vidpunkto kaj de gramatiko kaj de enhavo. La tekstoj inkluzivos aktualaĵojn, ĉu pri mondaj, ĉu pri esperantaj aferoj, ĉerpitajn ĝenerale el revuoj kaj magazinoj. Ni esploros kelkajn aspektojn de esperanta literaturo, ekzemple surbaze de mallongaj poemoj. La celo: konversaciigi kaj, super ĉio, amuziĝi."

Partopreno en Somerlernejo senkostas, sed nepre mendu vian lokon (prefere rete, sed ankaŭ retmesaĝe aŭ

telefone) kaj ne simple alvenu senaverte. Kursanoj devas mem trovi tranoktadon (ekzistas hoteloj ne longe for) kaj pagos sian manĝadon la sabaton vespere—sed la instruado kaj duma refresigado estas senpagaj.

Restas unu-du lokoj por la progresanta kurso, sed se vi interesiĝas pri la progresinta, certe kontaktu nin, ĉar foje homoj nuligas sian aliĝon.



**Drondo:** Por la tria sinsekva jaro ni starigos sesion de nia paroliga kurso la 1an de oktobro 2016 ĉe la YMCA Club, 112 Great Russell Street, Londono. Kiel en la antaŭaj du jaroj, la kurso daŭros de la 11a matene ĝis la 5a posttagmeze kaj kotizo koston £10.

Dum kvar sesioj nur en Esperanto diskutiĝos diversaj temoj, kutime du aktualaj, unu leĝera, kaj unu rilata al Esperanto. En la nuna ŝanĝiĝema politika

klimato ne indas nun decidi pri kiuj temoj estos aktualaj en oktobro, sed ekzemplajn notojn de la lastajara Drondo vi trovos ĉe la prieveinta retpaĝo, [esperanto.org.uk/events/drondo](http://esperanto.org.uk/events/drondo).

Tie vi ankaŭ trovos pli da informoj kaj aliĝilon—neretanoj kontaktu la oficejon.



**Lernu/Lernu Plu:** Following the two successful sessions of our beginners' and post-beginners' courses **Lernu** and **Lernu Plu** earlier this year, we've added another episode! The third session will take place from Esperanto House on October 14<sup>th</sup> and 15<sup>th</sup>, with Anna Lowenstein looking after our beginners, whilst Ian Carter and Tim Owen share the teaching duties for the students who have progressed a bit more. For more details and to sign up, visit [esperanto.org.uk/events/lernu](http://esperanto.org.uk/events/lernu).

Students will need to sort out their accommodation (we recommend the Travelodge at Trentham, [espinform.org/travelodge-trentham](http://espinform.org/travelodge-trentham)) and pay for their own meal on Saturday evening at a local restaurant, but the tuition and refreshments are entirely free.

## TRANSIRO DE HEROLDO

Fabricio Valle kaj Paulo Lima, partneroj en la entrepreno Sociala Grupo Lexus, eldonos la gazeton *Heroldo de Esperanto* ekde la jarkolekto 2017.

# LEXUS

SOCIALA ENTREPRENO

Valle, ĝis lastatempe redaktoro de *Esperanto*, informas, ke "fariĝi la eldonistoj de la tre renoma Heroldo de Esperanto estas revo de ĉiu ambicia entreprenisto".

Kial? Ĉar Heroldo portas brilan nomon kaj dum pluraj jardekoj estis unu el la ĉefaj Esperanto-legaĵoj. Je sia fondiĝo en 1920 (sub la nomo *Esperanto Triumfonta*) de Teo Jung, Heroldo estis unusemajna gazeto, kiu sukcese travivis la nazian reĝimon kaj la skismon inter UEA kaj la Internacia Esperanto-Ligo. De Jung transprenis la redaktadon Ada Fighiera-Sikorska en 1961, kiu ĝin redaktis ĝis sia morto en

1996.

Valle parolas pri Heroldo ambicie, indikante kvinpostenan skipon por eldoni ĝin, kaj multe pli grandan gazeton ol ĝi estis en la lastaj jaroj—24-paĝan aferon, laŭ liaj skizoj, depende de la financa bonstato. Tiun lastan li rekonas la granda minaco, agnoskante, ke necesas triobligi la legantaron por sufiĉe enspezi. Tutunue la novaj eldonistoj ĉelas 16-paĝan gazeton elirante ĉiun monaton—do entute multe pli da legomaterialo ol la nuna situacio, kiam Heroldo aperas 4-paĝa ĉiun trian semajnon.

Informoj baldaŭ aperos en la Facebook-paĝo de Lexus ([facebook.com/lexussociala](https://www.facebook.com/lexussociala)) kaj, laŭ Valle, en oktobro lanĉiĝos la abonkampanjo por 2017, kiam ili havos kaj anoncos la definitivajn trajtojn de la nova Heroldo.

**... KAJ TRANSIRO DE LA REVUO!** Ĉar Valle demisiis de sia rolo de redaktoro de la revuo de UEA, *Esperanto*, instaligiĝis en la postenojn la hungaro Attila Kaszás.

Ĝis nun la eldonoj aperis iom malfrue, sed tion oni povas kompreni rezulto de la freŝa alveno.

Pro la malfruo mi nur vidis unu ekzemplon, kiu pensigis min pri reveno al la antaŭa versio, kiun redaktadis Stano Marček.

Ricevas la revuon membroj de UEA. Eblas membriĝi al UEA ĉe [espinform.org/join-uea](http://espinform.org/join-uea), kontraŭ nur £8, kiu havigas al oni la retan version kaj ankaŭ 10%-an rabaton en la UEA libroservo dufoje dum la jaro. Pri tiu prezo


oni neniel povas plendi! Kiu preferas la paperan version, tiu kompreneble devas pagi pli, sed ankaŭ ricevas la libroservon-rabaton je ĉiu aĉetfojo kaj la jarlibron.



**NEW MEMBERS** Martin White (Leeds), Roman Bloodworth (Saltash), Elif Lewis (Hertford), Cariana Lewis (Hertford), Christopher Lewis (Hertford), Duncan Charters (Illinois), Jack Edwards (Dudley), Georgia Corrick (Southampton), Edward Penny (Hebden Bridge), Justin Laforce (Buxton), Dave Wetzal (Brentford), Reverend A R Price (Oxford), Marcus Richardson (Southampton), Rik Harwood (Middlewich), Saira Hall (Cheadle Hulme), Adam Hall (Cheadle Hulme), Kat Newbold (Basildon), Alina Mironova (Nottingham) **DECEASED MEMBERS** Miss H R Morton (Norbury), Tony Eddison (York), Norman Lock (Bristol) **COMPLETED THE ELEMENTARY COURSE** Kelly Payne (Dunstable), Simon Whiteley (Chapel-le-Dale) **EXAM CONGRATULATIONS** Rachel Stokes (Amersham: elementary exam—merit), Christopher Lewis (Hertford: elementary exam—distinction)

Por ĉiu eldono de Update **Jack Warren** preparas krucenigmon bazitan sur iu aparta temo. Jack celas, ke vi amuziĝu kaj eble lernu kelkajn novajn vortojn aŭ eĉ rememoru pri kelkaj iam forgesitaj. Vi povos kontroli viajn respondojn en la venonta eldono de Update.

## KRUCENIGMO: BIRDOJ



**Grava informo:** Ĉiu vorto estas substantivo kaj konsistas nur el la radiko, sen la o-finaĵo. Do se la respondo al la helpilo estas *esperanto*, aperos en la enigmo la vortformo *esperant*.

Respondoj al la *antaŭantaŭa* krucenigmo (Update 72)

Horizontale: 2 baseno, 5 piedvagad, 7 strand, 10 koktel, 12 sunombrel, 15 gvidist, 17 muze, 19 hotel

Vertikale: 1 banad, 3 park, 4 pasport, 6 valiz, 8 noktoklub, 9 junulgastej, 11 ekskurs, 13 ruldrom, 14 pram, 15 galeri, 16 tend, 18 fotil

Respondoj al la antaŭa krucenigmo

Horizontale: 3 faŭl, 5 gazon, 6 futbal, 7 hoke, 8 bazopilk, 11 polo, 12 retpilk, 16 pokal, 17 raked, 18 arbitraciant, 19 kroket

Vertikale: 1 golf, 2 gol, 4 manpilk, 5 globet, 9 korbopilk, 10 bilard, 13 skvaŝ, 14 rugbe, 15 tenis

### HORIZONTALE

2 - ŝatas pluvon, laŭ homoj, 4 - iuj bele kantas, 6 - eknestas en arbotruoj, 7 - ĉionmanĝanta marbirdo, 9 - el Nordameriko, 12 - pli granda ĉasbirdo, 14 - povas estis griza aŭ flava, 16 - granda rabobirdo, 17 - la femalo estas bruna, 18 - eta ĉasbirdo, 19 - indikas someron

### VERTIKALE

1 - ŝatas eknesti en ĝardenaj kestoj, 3 - longkolulo, 5 - kun ruĝa brusto, 6 - dukolora urba birdo, 8 - laŭta plumtufo, ŝatas erikejon, 10 - troviĝas are en urboj, 11 - nemuzika farmbirdo, 13 - iuj estas dreseblaj por sporto, 15 - senlaborigas akuŝistino

## easyfundraising

.org.uk

**Elizabeth Stanley raised in this year's AGM the idea of using a website to raise money for EAB, with the perk being that it wouldn't cost EAB members anything at all.**

All you have to do when you do your regular online shopping is access the site from a certain page, and a percentage of the money spent is returned to a nominated charity.

So what I've done is make it possible for EAB to be one of those charities, and all you have to do is create an account at [easyfundraising.com](http://easyfundraising.com) and nominate Esperanto-Asocio de Britio as your charity

to support.

Then whenever you fancy shopping on Amazon, ebay (with have our own account there too, [espinfo.org/ebay](http://espinfo.org/ebay)), John Lewis, Marks & Spencer, or any of the other hundreds of online retailers associated with it, go to [easyfundraising.com](http://easyfundraising.com) first. Find the retailer, click the "Go shopping" button and it will take you straight there, with a percentage of any money you spend during that visit returned to EAB. To simplify things you can even add your regular shopping sites to a favourites list.

So why not give it a go? It's quick and a way you can get a little money to EAB without it costing you anything!

**Clare Hunter**

## NE NUR POR JORKŜIRANOJ!

**Jack Warren informas pri du aferoj rilate la bultenon de la Jorkŝira Esperanto-Federacio, la Blankan Rozon.**

Unue, li tre bonvenigus pli da legantoj kaj do ĝi de nun estos senpage disponebla en virtuala formato. Due, li ankaŭ tre bonvenigus pli da kontribuantoj.

Por ricevi aŭ/kaj kontribui, necesas nur sendi retroŝtmesaĝon al Jack ĉe [p.warren47@hotmail.co.uk](mailto:p.warren47@hotmail.co.uk).

(Se via grupo ankaŭ havas sian propran eldonaĵon kaj vi deziras havigi ĝin virtuale al aliaj homoj, bonvolu kontakti min, kaj mi sciigos la legantojn de Update prie.)

 **Esperanto**  
Association of Britain

Update is published four times a year and complements the Esperanto-only magazine *La Brita Esperantisto*.

Esperanto House  
Station Road  
Barlston, Staffs  
ST12 9DE

+44 (0)1782 372141  
0845 230 1887

[esperanto.org.uk](http://esperanto.org.uk)

[eab@esperanto.org.uk](mailto:eab@esperanto.org.uk)

 @esperanto\_uk

 [esperanto.uk](http://esperanto.uk)